

Esperanto - La Bitbulteno 101

esperanto.es

NOTABLE ÉXITO DEL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO EN SORIA

El principal evento desde nuestro anterior boletín ha sido la celebración del 83º Congreso Español de Esperanto, que tuvo lugar a comienzos de mayo en la ciudad de Soria. Participaron más de 150 esperantistas de todas las regiones españolas y numerosos países europeos, con un programa muy rico, tanto cultural como lúdico y organizativo.

Del evento se hicieron eco los medios de comunicación locales, así como las emisoras de radio y la televisión regional (en [este enlace](#), desde el minuto 21,30).

Si no pudiste asistir, en [este enlace](#) puedes leer una crónica del mismo (en esperanto).

Numerosas fotos, vídeos y otros documentos sobre el congreso están ahora accesibles en la Bitoteca de la Federación, [en este enlace](#). Así mismo, en el [canal de Youtube](#) de la Federación Española de Esperanto se están publicando diversos vídeos, con algunas de las actividades que fueron registradas. Puedes acceder en [este enlace](#).

En la clausura se anunció que el próximo Congreso Español de Esperanto tendrá lugar en julio del 2026 en la localidad vizcaína de Portugalete.



NOVEDADES EDITORIALES PRESENTADAS EN SORIA

Durante el 83 Congreso Español de Esperanto se presentaron una serie de libros publicados en las últimas semanas, que pueden ser de interés para quienes no participaron en el evento, y que en su mayor parte se pueden adquirir en el [servicio de venta de libros](#) de la Federación Española de Esperanto:


– Antonio Valén [presentó](#) dos traducciones literarias. La primera fue “*Mil kretenoj*”, una colección de relatos del escritor catalán contemporáneo Quim Monzó, publicada recientemente por la Asociación Catalana de Esperanto y que puede adquirirse [en su servicio de venta de libros](#). La otra es la traducción de “*Réquiem por un campesino español*”, de Ramón J. Sender, que estará disponible próximamente en la editorial [Mondial](#).

– La asociación [Izquierda y Esperanto SATEH](#) presentó dos libros recientes de los que ya nos hemos hecho eco en previos boletines: “*Historieroj el alia vidpunkto*” (traducción de la serie de episodios históricos “[Contigo empezó todo](#)”) y el original “*Maruja Mallo. Mucho más que una artista de vanguardia*”, escrito por Ana Manero.

– También se presentó una obra ya reseñada, la selección de textos del intelectual gallego Vicente Risco, titulada “*Galegio estas mondo*”.

– Por último, pero no por ello menos importante, Miguel Gutiérrez Adúriz presentó la cuarta edición de su diccionario [Amika](#), el diccionario español-esperanto/esperanto-español más práctico de la actualidad. La propia Federación Española de Esperanto es la responsable de esta edición.

Para encargar cualquiera de ellos, ponte en contacto con nuestra asociación en la dirección libro@esperanto.es.



VÍDEOS SUBTITULADOS AL ESPERANTO

Una de las actividades del Congreso de Esperanto fue la proyección de una colección de vídeos subtítulos al esperanto, una actividad que está teniendo un importante impulso en la actualidad. Para aquellos que no pudieron asistir a las proyecciones (o solo parcialmente), aquí algunas propuestas que se pueden ver en la web:

- "Deziri ĝin estas krei ĝin", película sobre diversas iniciativas por la educación inclusiva en España: [en este enlace](#)
- "Ne timigas nin ruinoj", película de Yannis Youlountas sobre actividades autogestionadas en Grecia que puede verse [aquí](#).
- "Nebrideblaj", versión en esperanto de "Indomables, una historia de mujeres libres", que puede verse en [la Bitoteko de HEF](#).
- TED-Prelegoj: TED es una conocida serie de conferencias en red, sobre temas muy diversos, que tiene una amplia colección con subtítulos en esperanto, que pueden verse por ejemplo [en este enlace](#).
- "La Insulo de la Rozoj", sobre la Isla de las Rosas, un proyecto de territorio libre cerca de las costas italianas, que declaró el esperanto como lengua oficial. Puede verse una versión en esperanto [en este enlace](#), y con enlaces en castellano [aquí](#).

CONGRESOS INTERNACIONALES DURANTE EL VERANO

Como ya anunciamos en el último número, en los próximos meses están previstos muchos otros encuentros de esperanto, a nivel local, nacional o mundial. Volvemos a mencionar algunos de ellos, para animar a aquellos de nuestros lectores a los que les apetezca disfrutar de un ambiente verdaderamente internacional:

El más importante, como es lógico, será el Congreso Universal de Esperanto, que este año tendrá lugar en la ciudad checa de Brno entre el 26 de julio y el 2 de agosto. Puedes ver todos los detalles [en este enlace](#).

Todavía es posible apuntarse al [81º Congreso Internacional Juvenil \(IJK\)](#) que este año tendrá lugar en Cisarua (Indonesia) del 9 al 16 de agosto. Puedes apuntarte [aquí](#), y si quieres apoyar la participación de jóvenes de otros países, puedes contribuir en [este enlace](#).

El [congreso de la Liga de Profesores Esperantistas](#) tendrá lugar en Belgrado (Servia) entre el 19 y el 26 de julio.

La Asociación Anacionalista Mundial (SAT) tendrá su [encuentro anual](#) en el castillo de Grésillon, en Francia, entre el 9 y el 16 de agosto.

Puedes ver otros muchos encuentros, desde los más internacionales a los más modestos, incluidos muchos en red, en [EventaServo.org](#).



CISARUA 2025

ENTREGA DE PREMIOS DEL CONCURSO DE IDEAS PARA LA DIFUSIÓN DEL ESPERANTO

Tal como anunciamos, el 25 de abril tuvo lugar el acto de entrega de premios del II Concurso Internacional Francisco Máñez, en el salón de actos de la Fundación Cajacheste. Se trata de un concurso de ideas para la difusión y desarrollo del Esperanto, con el apoyo del [Ayuntamiento de Cheste](#), la Sociedad Cultural Ateneo la Alianza, la Fundación Caja Cheste y los grupos esperantistas de Cheste y Valencia.

Puedes consultar los resultados en [esta web](#), y una amplia crónica del acto, con muchas fotos [en este enlace](#), y un vídeo con la ceremonia completa, [aquí](#).



ARTÍCULO EN “EL CONFIDENCIAL”

Varios hablantes de esperanto fueron entrevistados para un reportaje publicado en el periódico digital “El Confidencial”. El artículo se titula «“En casa hablamos esperanto desde que mis hijas tenían dos años”: la lengua que traspasa generaciones», y aborda diversos aspectos de la lengua internacional y su estado actual. Se puede leer en [este enlace](#)


Pedro Hernández también fue entrevistado para el podcast “Ayer soñé”, presentado por Marta Gómez. Puedes verlo [en este enlace](#).



ARTÍCULO SOBRE LA HISTORIA DEL ESPERANTO EN ZAMORA

Un estudio recupera el movimiento esperantista en Zamora entre 1908 y 1936 y revela su impacto cultural. El artículo *Esperantistas y rayanos. La lengua internacional del esperanto en Zamora (1908-1936)*, firmado por el investigador Carlos Coca Durán ha sido publicado en el número 27 de la revista portuguesa *Côa Visão*, y se puede leer en abierto en el portal "[Ser histórico](#)". El estudio rescata del olvido a numerosos referentes culturales zamoranos que defendieron este idioma internacional como símbolo de progreso, libertad y entendimiento entre pueblos


El artículo subraya que hoy en día el esperanto sigue despertando interés, incluso con detalles simbólicos como el uso del término *Fromaço* para referirse a la feria del queso zamorana. Del estudio se ha hecho eco la prensa local ([1](#) y [2](#)). Una muestra de que la lengua planificada que soñó con unir a la humanidad sigue viva también en la memoria local.



RAFAELA URUEÑA, PRESIDENTA DE HONOR DE LA FEDERACIÓN

Durante el Congreso de Esperanto Español, se celebró la Asamblea General oficial de la Federación Española de Esperanto. La decisión más destacable fue el nombramiento de [María Rafaela Urueña](#) como Presidenta Honoraria de la asociación. El congreso se clausuró con un homenaje público, al que se unieron por vídeo varias personas que contribuyeron a su labor en el movimiento esperantista.

Felicitemos a Rafaela y le damos las gracias por su amplia actividad a lo largo de estos años.





RIMARKINDA SUKCESO DE LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

La ĉefa evento pri Esperanto en Hispanio ekde la pasinta Bitbulteno estis la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso, kiu okazis komence de majo en la urbo Sorio. La aranĝon partoprenis pli ol 150 esperantistoj el ĉiuj regionoj de Hispanio kaj pluraj eŭropaj landoj, kun tre riĉa programo, tiel kultura kiel distra kaj organiza.

Pri la evento raportis lokaj amaskomunikiloj, kaj ankaŭ la radio kaj la regiona televidstacio (ĉe [ĉi tiu ligilo](#), ekde minuto 21:30).

Se vi ne povis ĉeesti, vi povas legi raporton en Esperanto pri la evento ĉe [ĉi tiu ligilo](#).

Multaj fotoj, filmetoj kaj aliaj dokumentoj pri la kongreso nun haveblas en la Bitoteko de la Federacio ĉe [ĉi tiu ligilo](#). Same, pluraj filmetoj estas publikigataj en la Jutuba kanalo de Hispana Esperanta Federacio, montrante kelkajn el la registritaj agadoj. Vi povas aliri ilin ĉe [ĉi tiu ligilo](#).

La sekva Hispana Esperanta Kongreso okazos en julio 2026 en la biskaja urbo Portugaleta (tre proksima al Bilbao).



NOVAJ ELDONAĴOJ PREZENTITAJ EN LA HISPANA KONGRESO

Dum la [83-a Hispana Kongreso de Esperanto](#) estis prezentitaj kelkaj libroj eldonitaj dum la lastaj semajnoj, kiuj povas interesi la ne partoprenintojn en la evento, kaj kiujn plejofte vi povas aĉeti en la [libroservo de HEF](#):

– Antonio Valén prezentis du literaturajn tradukojn. Unu estis **“Mil kretenoj”**, novelaro de la kataluna nuntempa verkisto Quim Monzó, ĵus eldonita de Kataluna Esperanto-Asocio, kaj aĉetebla en [ties libroservo](#). La alia estas **“Rekviemo por hispana kamparano”**, de Ramón J. Sender, mallonga romano kiu fariĝis klasikaĵo de la hispana literaturo; la verko estos baldaŭ havebla ĉe la eldonejo Mondial (videon pri ambaŭ prezentadoj spektu en [tiu ĉi ligilo](#))

– [SAT-en-Hispanio](#) prezentis du novajn librojn pri kiuj ni jam informis en pasintaj Bitbultenoj: **“Historieroj el alia vidpunkto”**, kolekton de epizodoj el la historio de Hispanio, reliefigante sociajn luktojn kaj subpremojn, kaj **“Maruja Mallo. Multe pli ol avangarda artistino”**, dulingvan biografion pri grava pentristino de la dudeka jarcento, verkitan de Ana Manero. (vidu videon pri la prezentado dum la kongreso [tie ĉi](#))

– Estis publike prezentita alia verko jam menciita antaŭe en nia bulteno, **“Galegio estas mondo”**, kun tekstoj de fama galega intelektulo Vicente Risco.

– Fine, sed ne malplej grave, Miguel Gutiérrez Adúriz prezentis la kvaran eldonon de sia vortaro **Amika**, la plej praktika hispana-esperanta/esperanta-hispana vortaro nuntempa. Pri tiu ĉi eldono respondecas Hispana Esperanto-Federacio mem.

Por mendi tiujn kaj aliajn librojn, kontaktu nian asocion ĉe la adreso libro@esperanto.es.

Quim Monzó

Mil cretins Mil kretenoj

Esperanta traduko de Antonio Valén



Collecció Jaume Grau Casas

ESPERANTO*
CAT

*Associació Catalana d'Esperanto/Kataluna Esperanto-Asocio

VIDEOJ SUBTEKSTIGITAJ EN ESPERANTON

Unu el la programeroj de la Hispana Esperanto-Kongreso estis la projekciado de festivalo de filmoj subtekstigitaj en Esperanto, kiu estas aktivado kun granda elano lastatempe. Por tiuj kiuj ne povis spekti ilin (aŭ nur parte), jen iujn proponojn spekteblajn rete:

- "Deziri ĝin estas krei ĝin", filmo pri diversaj iniciatoj en Hispanio favore al inkluzivema edukado, spektebla [en la retejo de asocio por tiu celo](#)
- "Ne timigas nin ruinoj", filmo de Yannis Youlountas subtene al solidarecaj iniciativoj memzorgataj en Grekio, spektebla en [tiu ĉi ligilo](#).
- "Nebrideblaj. Historio pri liberaj virinoj" elŝutebla el la [Bitoteko de HEF](#).
- TED-Prelegoj: serio da prelegoj, kiuj fariĝis tre popularaj en la mondo antaŭ kelkaj jaroj, pro la (malteda) vikleco de la prezentado. Oni povas spekti jam pli ol 150 videojn kun esperanta teksto, ekzemple [en tiu ĉi ligilo](#).
- "La Insulo de la Rozoj", filmo pri la historio de la libera teritorio proksima al la italia marbordo, kiu deklaris Esperanton kiel oficialan lingvon. Spektebla ĉe [tiu ĉi ligilo](#).



INTERNACIAJ KONGRESOJ DUM LA TUTA SOMERO

Kiel ni jam anoncis en la pasinta bulteno, multaj esperantaj renkontiĝoj estas antaŭvidataj por la venontaj monatoj, je loka, landa aŭ internacia skalo. Ni ripetas kelkajn el ili, por instigi tiujn inter niaj legantoj, kiuj havos tempon kaj emon partopreni vere internacian etoson:

La plej grava estos la Universala Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazos en la ĉeĥa urbo Brno (aŭ Burno) inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto. Vi povas aliri ĉiujn detalojn [en tiu ĉi ligilo](#).

Daŭre eblas aliĝi al la [81-a Internacia Junulara Kongreso \(IJK\)](#) kiu okazos en Cisarua (Indonezio) de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025. Vi povas [aliĝi tie ĉi](#), kaj ankaŭ eblas subteni la partoprenon de junuloj tutmondaj per [donacado al la kongreso](#).

La [Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj \(ILEI\)](#) okazos en Beogrado (Serbio) inter la 19-a kaj 26-a de julio.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazigos sian [kongreson ĉijaran](#) en Francio, en la kastelo Greziljono inter la 9-a kaj 16-a de aŭgusto.

Vi povas trovi multajn aliajn renkontojn, el la plej internacia, ĝis la lokaj kaj eĉ multaj retaj pere de la retejo [EventaServo.org](#).



CEREMONIO DE DISDONADO DE PREMIOJ POR LA KONKURSO POR DISVASTIGO DE ESPERANTO

Kiel anoncite, la vendredon 25an de aprilo en la salono de la Fondaĵo Cajacheste, en la urbo Cheste (Valencilando), okazis la ceremonio de disdonado de premioj de la Dua Internacia Konkurso Francisco Máñez, por la disvastigo kaj disvolvo de Esperanto, kunvokita kun la apogo de la Urbeŝtaro de la urbo Cheste, la Kultura Societo Ateneo la Alianza, la Fondaĵo Cajacheste kaj la esperantistaj grupoj de Cheste kaj Valencio.

Vi povas konsulti la gajnintojn en [tiu ĉi ligilo](#), filmon pri la disdono de premioj [tie ĉi](#), kaj ampleksan informadon pri la ceremonio (en la hispana, sed kun multaj fotoj) en [tiu ĉi raporto](#) en la retejo de la Urbodomo de Cheste (en la suba foto, akceptado de premio, kun la ĉeesto de la urbestro kaj la skabenino pri kulturo).



ARTIKOLO EN “EL CONFIDENCIAL”

Pluraj esperantistoj estis intervjuitaj por raporto kiu aperis en la tre legata reta gazeto “El Confidencial”. La titolo de la artikolo estas «“En casa hablamos esperanto desde que mis hijas

tenían dos años”: la lengua que traspasa generaciones». Ĝi pritraktas diversajn aspektojn de la internacia lingvo kaj ĝia stato. Vi povas ĝin legi en [tiu ĉi ligilo](#)

Pedro Hernández estis ankaŭ intervjuita por podkasto nomata “Ayer soñé” (Hieraŭ mi sonĝis), kiun gvidas Marta Gómez. Vi povas ĝin spekti en [tiu ĉi ligilo](#).



ARTIKOLO PRI HISTORIO DE ESPERANTO EN ZAMORO

Ĝus publikigita studaĵo ekzamenas la Esperanto-movadon en Zamoro inter 1908 kaj 1936 kaj malkaŝas ĝian kulturan efikon. La artikolo, verkita de la esploristo Carlos Coca Durán kaj publikigita en la numero 27 de la portugala revuo “Côa Visão”, titoliĝas *Esperantistas y rayanos. La lengua internacional del esperanto en Zamora (1908-1936)* (Esperantistoj kaj limanoj: La Internacia Lingvo Esperanto en Zamoro). Ĉi tiu artikolo savas el la forgeso multajn kulturajn figurojn el Zamoro, kiuj defendis tiun ĉi internacian lingvon kiel simbolon de progreso, libereco kaj kompreno inter popoloj.

La artikolo, legebla ankaŭ en la retejo de *Ser Histórico* (vidu [ĉi tie](#), hispane), reliefigas, ke Esperanto daŭre vekas intereson hodiaŭ, eĉ kun simbolaj detaloj kiel la uzo de la termino *Fromaĝo* (tiel, en Esperanto) por aludi la Zamoran fromaĝfoiron. La artikolon eĥis la lokaj amaskomunikiloj, kiel vi povas legi en tiuj ĉi ligiloj: [1](#) kaj [2](#). Tio estas pruvo, ke ankaŭ la planlingvo, kiu revis unuigi la homaron, vivas plu en la loka memoro.



RAFAELA URUEÑA, HONORA PREZIDANTO DE HEF

Dum la Hispana Esperanto-Kongreso okazis la oficiala Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio. La ĉefa decido dum ĝi estis la nomumo de [María Rafaela Urueña](#) kiel Honora Prezidanto de la asocio. Publika omaĝo al ŝi, al kiu aliĝis videe kelkaj homoj kontribuintaj al ŝia agado en la jura kaj internacia Esperanto-movado, fermis la kongreson.

Gratulon kaj dankon al Rafaela pro ŝia agado kaj sinteno.



